

« La Nigra Kokino »

Post la morto de la pastro, kiu venkis lin, la Demono revenis por tenti la loĝantojn de Bouresse.

Li aperis laŭdire dum la plej mallumaj noktoj ĉe la kruciĝejo de la tri vojetoj de la Fonto-de-la-Mortintoj.

Li formiĝis kiel nigra kokino kun la brilegaj okuloj, kiu, kiam sonoris noktomezo, eligis teruran blekegon, vekanta abrupte ĉion, kio dormis en la komunumo.

Vagulo scianta nenion pri tiu afero, ĉar li venis de malproksime, endormiĝis apud la malbenita loko ; je sia timego li vidis la kokinon, kaj per siaj piedoj ĝi skrapis la grundon, el kiu spruĉis oraj moneroj kaj fajraj trenajoj. La apero estis mallonga, sed la oro restadis brilanta en la herboj : ektagiĝe ĝi estis malaperinta , sen tio ke la almozulo pensis pluki ĝin.

La morgaŭon la loĝantoj de la vilaĝo aŭskultis silente la rakonton de la vagulo, kaj ĉiuj promesis eviti la kruciĝejon. Tamen la loka kastelestro ne konis timon ; li estis turmentata per stranga deziro : vidi la kokinon... "Nenio malbona okazis al tiu mizerulo; kial mi ne irus tien ? " Nokte li iris tien. Sed la vagulo antaŭe vidis la Demonon nur malgraŭ li, spite, ke la kastelestro paŝis volonte al lia renkonto.

Kvankam la temerarulo estis kaŝita en la erikoj, direkte al li la kokino antaŭeniris por bleki. La homo konis timon ; li volis fuĝi, sed lia rigardo ne povis deturniĝi de la brilantegaj pupiloj. La Demono paŝis al li ; kaj la flamoj elspruĉis el liaj paŝoj. Kiaj ruĝaj ili estis ! Li svenis. La morgaŭon li retrovis sin en la erikejo, sola, angora, maljuniĝinta, damnita.

La tagoj pasis kaj la kastelestro ne retrovis pacon. Li ne povis dormi sen revidi la inferajn flamojn, kaj, se okazis al li renkonti nigran kokinon, li paliĝis kaj deturnis la rigardon.

Li aĉetis ĉiujn lokajn nigrajn kokinojn por tranĉi iliajn gorĝon, sed tie je noktomezo la kriego bruegis ankoraŭ. Li provis preĝi, vizitadi la preĝejon, plenumi bonajn agadojn ; sed lia gorĝo sin stringis, liaj gamboj ne plu portis lin ; ofte la malriĉuloj, kiuj sciis lian pasintaĵon, rifuzis lian almozon.

Tiam li decidis pilgrimi en Sanktan Teron. Lia pento estis sincera, liaj turmentoj antaŭe estis grandaj : la Sinjoro kompatis.

Dum longaj monatoj oni ne sciis novaĵojn ; sed, kiam li atingis Jerusalemon, la loĝantoj de Bouresse estis avertitaj pri tio, ĉar tiun ĉi nokton neniu aŭdis la blekon de la kokino. Kaj neniu plu aŭdis ĝin de tiam...

